

Naskiĝo de la svisa federacio, akriĝo de la konfliktoj
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1991.02.28 & 03.03

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND nome de Svisa Radio Internacia.

En Svislando, ekde la postnapoleona periodo intelektuloj, komercistoj kaj metiistoj sentis la restarigon de la malnovaj reĝimoj kiel malaperon de civitanaj liberecoj.

A.- La komercistoj alvokis favore al tutsvisa merkato kun unuecigita monsisistemo. La intelektuloj verkis eseojn pri la demokrata vivo kaj pri la liberecoj. Tiel kreiĝis doktrino, kiu baldaŭ ricevos la nomon liberalismo.

Cl.- La doktrino de la liberalismo entuziasmigis la civitanojn en la industriiĝintaj regionoj. En multaj kantonoj adeptoj de la liberalismo estis elektitaj al registaraj funkcioj. Konstitucioj modernigis en kelkaj kantonoj.

A.- Sed la doktrino de la liberalismo ŝajnis tro timema al reformemuloj, kiuj deziris ĝisradikajn sociajn ŝanĝojn. Oni nomis radikalistoj tiujn revoluciulojn. Ili deziris starigi centrisman superkantonan registaron, limigi la rajton de la industriaj mastroj super iliaj dungitoj, doni lernejojn al ĉiuj infanoj, jure disigi la ŝtaton de la eklezio...

Cl.- Tiu programo ekzaltis la naskiĝintan superkantonan patriotismon. Inter la jaroj 1826 kaj 1832, kiel ondeg, la radikalista revolucio forbalais la aristokratajn registarojn en dekdu kantonoj.

A.- Sed samtempe tiu radikalista revolucio vekis fortan kontraŭstaron en la montaraj kantonoj kun popolkunveno nomata en la germana lingvo Landsgemeinde. La koncernaj civitanoj sentis la bezonon defendi siajn demokratajn tradiciojn.

Cl. - Ni troviĝas antaŭ ideologia disputo, kiu venenis la debatojn en la svisa Dieto. Ekde 1832 la radikalistoj reprezentis pli ol la duono de la svisa loĝantaro. La konservativuloj ilin timis. Inter la du partioj dialogo ne plu eblis. Tial nesolvitaj problemoj amasiĝadis kaj la spiritoj pli kaj pli ekscitiĝis.

A.- En la kanton Bazelo la politikaj disputoj kondukis al civilaj militoj. Baldaŭ du konkurencaj registaroj kunezistis. La urbo konservis aristokratan reĝimon kaj la kamparo sin organizis sub radikalista konstitucio. Tiu divido de la ŝtato en du duonkantonoj fine solvis la kantonajn disputojn. Tamen ĝi akriĝis la kverelojn en la svisa Dieto. La ambasadoro de Bazelo urba ne akceptis kunsidi en la ĉeesto de la delegito de Bazelo kampara. Anstataŭ kvietigi tiujn du ekscititojn, la aliaj delegitoj partoprenis ilian disputon. Por malhelpi ĉian voĉdonon en la Dieto la ambasadoroj de la kantonoj Uri, Schwyz, Unterwalden, Valezo kaj Neuchâtel siavice rifuzis kunsidi kun la radikalista delegito de Bazelo kampara.

Cl.- Ĉu tiu kverelo ne pensigas al kompareblaj konfliktoj, kiuj nuntempe venenas la vivon en la mondorganizaĵoj?

A.- En 1832 Papo Gregoro dekseka kondamnis la modernajn politikajn doktrinojn. Pro tiu kondamno formiĝis du tendencoj en la svisa katolikismo. La klerikala blinde obeis al la papo, dum la kontraŭklerikala volis kontrolon de la ŝtato super la eklezia vivo.

Cl.- La kantono Aargau havas religie miksitajn loĝantaron. Pro tio ĝi konis reĝimon de religia egaleco. Tiu sistemo donis en la parlamento nomata Granda Konsilantaro saman nombron de deputitoj al ambaŭ religioj. La klerikala tendenco ne plu kontentiĝis pri tiu konstitucio. Ĝi deziris ĝian revizion kun starigo de dupartigo laŭ la religioj de ĉiuj organoj de la ŝtato. La katolikoj havu sian registaron, sian justicon, sian parlamenton apud la protestanta registaro, la protestanta justico, la protestanta parlamento. Du referendumoj kondukis al starigo de nova konstitucio, en kiu, por protesti kontraŭ la pretendoj de la klerikalistoj, oni ne plu okupiĝas pri la religioj. La katolikaj kontraŭklerikalistoj voĉdonis kun la protestantoj, kiuj favoris la senreligiecon de la aŭtoritatoj.

A.- La klerikalistoj ne povis akcepti tiun malvenkon. Ili organizis ribeladon. Sed la kantona registaro tuj reagis. Oni rimarkis, ke la monaĥoj partoprenas la ribeladon. Pro tio per cent dekkvin voĉoj kontraŭ deknaŭ la Granda Konsilantaro decidis la fermon de la monaĥejoj. La granda plimulto de la katolikoj voĉis por tiu decido. En paca klimato tiu decido ne estus kaŭzonta konfliktojn. Ĝam multaj fermo de monaĥejoj estis okazintaj en aliaj kantoj.

Cl.- La svisa Dieto estis kunvokita por aprilo 1841 en Berno. Ĉu ĝi kapablos interveni kun aŭtoritato? En la lando oni sentis, ke tiu Dieto kunsido estos decidiga por la estonteco mem de la svisa Ligo. Ĉu la Pakto estos respektata?

A.- Sed ĉiu interpretis la Ĉarton laŭ siaj personaj gustoj kaj politikaj sintenoj. Ne ekzistis tribunalo aŭ juristaro kapabla doni oficialan interpreton. Antaŭ sia forveturo al Berno la ambasadoroj estis ricevintaj striktajn ordonojn, kaj pro tio diskutoj ne plu povis disvolviĝi. La radikalistaj registaroj estis ordonintaj diri:

Cl.- "La Dieto ne rajtas interveni por revenigi la monaĥojn en la Aargauajn monaĥejojn, ĉar tiu interveno estus kontraŭa al la unua artikolo de la Pakto, kiu garantias la suverenecon de la kantoj. Se la Dieto intervenos en la internajn aferojn de la kantono Aargau, la Pakto estos atencita."

A.- La konservativaj registaroj estis ordonintaj diri:

Cl.- "La Dieto devas interveni por revenigi la monaĥojn en la Aargauajn monaĥejojn, ĉar la dua artikolo de la Pakto garantias la ekzistadon de la monaĥejoj. Se la Dieto ne intervenas tiel, estos atenco kontraŭ la Pakto."

A.- La hodiaŭaj internaciaj konferencoj kutimigis nin al tiu diplomata dialogado inter surduloj. Oni povas sin demandi, kial tiuj ambasadoroj grupiĝis en Berno? Verŝajne por konvinki la propran publikan opinion pri la praveco de la propra kaŭzo. Sed samtempe ili malebligis la civitanojn aŭdi la kontraŭan vidpunkton.

Cl.- En 1843, du jarojn post tiu Dieto kunsido, en nova Dieto kunveno la delegitoj de Lucerno, Uri, Schwyz, Unterwalden, Zug, Frejburgo, Valezo kaj ekstera Appenzel solene protestis, ĉar la registaro de Aarau ne nuligis sian decidon fermi la monaĥejojn. Tiuj delegitoj renkontiĝis en Brunnen (kantono Schwyz) por starigi sekretan ligan kontraŭ la radikalistaj registaroj. En tiu sekreta pakto ili antaŭvidis militpreparon kaj serĉon de apogo de ekstera potenco, kiel la Habsburga Imperio.

A.- La registaro de la kantono Lucerno serĉis metodon por malkontentigi la kontraŭklerikalistojn. Ĝi incitis la jezuitojn reveni en Lucernon, el kie ili estis forpelitaj. Jen fakto, kiu en paca tempo ne estus vekinta disputojn. En la kantoj Frejburgo, Schwyz kaj Valezo la jezuitoj posedis famajn lernejojn. La lucernanoj, kiuj devis voĉi por aŭ kontraŭ la alveno de la jezuitoj en sian kantonon fakte voĉis por aŭ kontraŭ la aĉa lando Aargau.

Cl.- La radikalistoj ne povis interveni perleĝe. La Pakto donis al ĉiu kantono absolutan religian kaj instruon aŭtonomecon. Tial ili trovis nelegan rimedon. Ili kreis volontularojn, kies celo estis ataki la kantonon Lucerno. Estis la komenco de la Sonderbunda konflikto. Pri ĝi ni raportos la venontan semajnon.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée GACOND pretas sendi la tekston de sia prelegaro pri la formiĝo de la Svisa Federacio al la geaŭdantoj, kiuj petos ĝin skribi. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), aŭgusto 2012*